BRAZILA KONSILANTARO DE ESPERANTO
8-6-1974

CGC Nº
00406 504/0001-06

# Conselho Brasileiro de Esperanto

SEDE PRÓPRIA
Ed. Jockey Club, sala 103
Telefone (061) 226-1298
70.300 - Brasília - DF

PRESIDÊNCIA
Alameda dos Maruas, 471
Telefone (011) 275-1681
04.068 - São Paulo - SP


JUL/AGO/1984 BOLETIM INFORMATIVO Nº 84

## INTEGRIĜO POSTULAS NIAN LABOREGON

**Walter Francini**

Rekorda nombro da aliĝoj (446), dudek du asocioj aliĝintaj (kvin eksternovadaj) kaj dek ses ŝtatoj plus Federacia Distrikto reprezentitaj, jen kelkaj ciferoj pri la 20-a Brazila Kongreso de Esperanto, okazinta en Kampinas, SP, de la 12-a ĝis la 15-a de Julio.

Pri la evento la organiza komitato multe informis la amaskomunikilojn kaj rezulte pluraj radiostacioj, gazetoj kaj tv-kanaloj informis pri la Kongreso. TV Gazeta, de San-Paŭlo, prezentis intervjuon kun la redaktinto de tiu ĉi materio, kaj Radio Bandeirantes unuhoran intervjuon kun la sama redaktinto kaj s-ro Adolpho Muniz Furtado, prezidento de Brazila Instituto de Esperanto. Kompreneble en Kampinas la amaskomunikiloj, inkluzive de la loka tv-kanalo, dediĉis grandan atenton al la evento. Simpla sed alloga afiŝo kreita de prof. Luiz Telles, la verkinto de l' medaliono pri Zamenhof, disvastigis la kongreson tra Brazilo. La kongresa simbolo estis reproduktita en kelkaj nacilingvaj gazetoj kaj Esperanto-bultenoj. Krome, de la 4-a ĝis la 12-a de Julio okazis en Kampinas grava ekspozicio de pentraĵoj, sub la respondeco de Universala Artista Ligo de Esperantistoj. Kaj la ekspozicio kaj la Kongreso estis anoncitaj en "Ver e Ouvir", la ĉiumonata bulteno eldonata de Komunumo de Kampinas.



**Solena malfermo de la XX Brazila Kongreso de Esperanto. De maldekstre, s-roj Carlos Cunha, Álvaro Fausto de Souza, Fernando J.G. Marinho (prezidantoj de BKE, KKE kaj BEL), deputito Osiro Silveira, prezidanto de la kongreso, d-ro Ozayr Rizzo, prezidanto de la urbkonsilantaro kaj prof. Ivon Barbosa, ĉefdelegito de UEA en Brazilo.**

### Carlos Gomes ĉeestis

Majesta estas la ĝusta epiteto, kiun oni devas atribui al la malferma soleno. Por tio kontribuis la taŭgeco de la Komunuma Salono, la graveco de la ĉeestantaj aŭtoritatuloj kaj la helpo de la muzika arto, unue pere de la muzikistaro de l' 8-a Bataliono de Militista Polico kaj poste pere de belega programo prezentita en du partoj de ĥoro "Carlos Gomes", 30-voĉa aro, apartenanta al Spiritisma Federacio de Ŝtato San-Paŭlo, estrata de prof-ino Henriqueta Moreira. En la muzika prezentado brile kontribuis la akompanantino ĉe piano prof-ino Orchidea Lino kaj soprano Assunção de Luca, opera kantistino ĉe Komunuma Teatro en San-Paŭlo. Ŝia interpretado de la lasta numero de l' programo, "La Carità" de Rossini, profunde impresis pro la potenco kaj dolĉeco de ŝia voĉo.

La prezidento de l' Kongreso estis deputito Osiro Silveira, kiu dum la malferma soleno, informis la publikon pri sia leĝoprojekto enkondukanta Esperanton en la lernejojn.

### Zamenhof en Kampinas

La Kongresa programo estis riĉa, eble tro abunda rilate la mallongecon de la disponebla tempo: nur du utilaj tagoj. Tio pensigas, ke eble estos dezirinde pliigi estonte la numeron de la kongresaj tagoj.

Krom la bonegaj prelegoj prezentitaj de s-roj Roberto Resende, Nelson Pereira de Souza, Genildo Martins Coelho, Geraldo Mattos, Victor

Sadler, Gilbert R. Ledon, Sylla Chaves kaj Carlos Lima Melo, okazis du programeroj, kiuj altiris la partoprenon de l' plimulto: la kurso por komencantoj, en kvin horoj, de prof. Sylla Chaves, kaj la konversaciaj rondoj, gviditaj de d-ro Victor Sadler. Tiuj eroj nepras en kongresoj, por altiri la eksteran publikon kaj la neesperantistajn akompanantojn de kongresanoj, kaj por paroligi la finintojn de bazaj kursoj.

Okazis multe de fakaj kunvenoj: pri arto, vegetarismo, lingvaj demandoj, kompilado de Esperanto-vortaroj, UEA-delegitoj, Nacia Esperanto-komisiono, Filozofia Asocio Tutmonda, instruado, katolikismo, Oomoto, Spiritismo. Brazila Esperantista Junulara Organizo estigis ĝeneralan kunsidon. Krome ĝi bone zorgis pri la Kongresa libroservo, kiu enspezis pli ol du milionojn da kurzejroj.

Unu el la plej amuzaj kaj enspezigaj eroj de l' programo estis la du aukcioj, majstre kaj bonhumore faritaj de s-ro Gilbert R. Ledon kun la helpo de lia edzino s-ino Symilde.

Krom la menciitaj aukcioj la Kongreso prezentis ankaŭ aliajn gravajn amuzajn erojn: Artan Vesperon, sub la reĝisorado de Amarílio Carvalho; ekskurson tra Kampinas kaj viziton al "Bosque" per mikrobusoj afable ceditaj de urbestro d-ro José Roberto Magalhães Teixeira kaj la komunan tagmanĝon ĉe Restoracio Polo Norte, kiun partoprenis 138 personoj.

Kortuŝa ceremonio okazis la 14-an de Julio, ĉe placo Napoleão Laureano pro la inaŭguro de medaliono pri Zamenhof, inkrustita en du metrojn alta bloko el betono. Apud ĝi oni fiksis surtere la cementan konturon de kvinpinta stelo, en kies interno oni plantis verdkoloran herbobedon. Riĉiĝis la solenon la muziko lerte ludita de muzikistaro en elegantaj uniformoj, kies membroj estas infanoj kaj junuloj maksimume dekokjaraj.

### Pri la kompleta integriĝo

La plej grava ero de la programo estis certe la diskutado de la Kongresa temo: "integriĝo en brazila Esperanto-movado". Ĉu la Kongreso favoris tiun integriĝon?

Al nekonantoj de la movado en Brazilo povas ŝajni ke ne, kiel pensas iu juna samideano jenon dirinta al la redaktinto: "Mi vidas en Brazilo unuflanke estrantaron bonintencan kaj laboreman sed nevolantan integriĝi komplete, kaj aliflanke novajn valorulojn aperantajn multnombre, kiuj jam uzas flue la lingvon kaj komencas doni sian kulturan kontribuon. Kial ne profiti la favoran psikologian momenton por estigi la plej grandan brazilan kontribuon por la Centjariĝo de Esperanto, nome la definitivan integriĝon de la nacia esperantistaro?" Ĉu tiu pensmaniero pravas? Vere, se oni konsideras la **situacion** iam ekzistantan, oni povas aserti **kun certeco**, ke la brazila integriĝo okazas malrapide sed nerezistebIe. Paroli ekzemple, kiel okazis dumkongrese pri komunaj jarkotizo kaj bulteno estis nur revo antaŭ kelkaj jaroj. Sed oni devas serioze labori por ke la bona etoso jam ekzistanta de kelka tempo kaj plibonigita de la Kongreso abunde fruktodonu. Ideoj kaj vortoj estu nur deirpunktoj. Agado senlaca kaj racia akompanu ilin.



## MONDONACOJ POR LA BULTENO

Sinceran dankon ni prezentas al la subaj bonkoraj samideanoj, pro iliaj financaj kontribuoj celantaj a regulan eldonadon de nia Informa Bulteno:

| | | |
|---|---|---|
| Ivon Barbosa . . . . . . . . . . . . | Cr$ | 800 |
| Marcello Vieira de Andrade . . . | Cr$ | 3.000 |
| Nelson Ribeiro . . . . . . . . . . | Cr$ | 60.000 |
| Roberto Vieira Resende . . . . . | Cr$ | 3.000 |
| Washington L.A. de Souza . . . | Cr$ | 4.000 |
| Othon Branco Baena . . . . . . . | Cr$ | 10.000 |
| Jair Salles . . . . . . . . . . . . | Cr$ | 4.000 |
| Jorge Agnelo da Cruz . . . . . . | Cr$ | 1.000 |
| Ezequias Raimundo Alves . . . . | Cr$ | 4.000 |
| Edésio Eustáquio Avelar . . . . . | Cr$ | 3.000 |
| Licy Sarmento Oliveira . . . . . | Cr$ | 3.000 |
| Scheilla Sarmento Oliveira . . . | Cr$ | 3.000 |
| Zélia Maria . . . . . . . . . . . . | Cr$ | 3.000 |
| Sumo | Cr$ | 101.800 |


## BRAZILA KONSILANTARO DE ESPERANTO

**HONORA PREZIDANTO**

Francisco de Souza Almada - Av. Bernardino de Campos, 624 ap. 72, BR 11100 - Santos - SP.

**Estraro**

**Prezidanto:** Carlos A. S. da Cunha, Alameda dos Maruás, 471, Planalto Paulista, BR 04.068, São Paulo - SP

**Vic-prezidanto:** Nelson P. de Souza, Caixa Postal 07-1182, BR 70000 - Brasília - DF

**Kasisto:** José Carlos Dorini Ramos - SHIN QI 02 - Cj. 08, casa 15, BR 71500 - Brasília - DF

**Sekretario:** F-ino Lêda da Silva Gama, SQS 306-A 101, BR 70353 - Brasília - DF

**Kulturaj Aferoj:** Walter A. Francini, Rua Afonso Bandeira de Melo, 35, Campo Belo, BR 04613, São Paulo-SP

**Informa Bulteno**

Dumonata Oficiala Organo de la Asocio
Jarabono Cr$ 3.000,00
Por aliaj landoj, US$ 5.00
Asociaj membroj ricevas ĝin senpage

**RESPONDECAJ DIREKTOROJ**

Carlos A. S. Cunha (ĉefredaktoro), Nelson P. Souza kaj Walter Francini

Kunlaboraĵoj intelektaj estas bonvenaj. La estraro, tamen, ne respondecas pri subskribitaj artikoloj.



# TRA LA MONDO

## UNIVERSALA KONGRESO EN VANKUVERO

△ Al la 69-a UK okazinta inter 21/28 de julio aliĝis 803 personoj, aliĝnombro kiu estas malplialta ol tiu de la lasta kongreso efektivigita en la norda hemisfero de la amerika kontinento, plej precize en Portland, Usono, en 1972 (57-a UK, kun 923 aliĝintoj).

△ Representis nian landon en Vankuvero d-ro Evaldo Pauli, kiel anstataŭinto de komitatano A elektita de BEL. Laŭ ĝentila informo de tiu reprezentanto, la komitatkunsidoj ĉiam prezentis kvorumon por plenrajtaj decidoj kaj, sub teknikaj aspektoj, la kongreso estis sukcesa.

△ D-ro Pauli prezidis la Duan Simpozion Internacian pri Filozofio, dum kiu oni debatis du ĉefajn temojn: "Kio estas Filozofio kaj kio estas Scienco", kiun li mem prezentis kaj "Filozofio kaj Kibernetiko", temo pri kiu prelegis d-ro Helmar Frank.

## UEA-STATISTIKO KOREKTENDA

△ Tute male ol informas UEA en siaj lastaj jarlibroj ekde 1982, al la 66-a UK efektivigita en Brasília aliĝis 1750 personoj, kaj ne 1749! La iama Konstanta Kongresa Sekretario, s-ro Charles R.Power estis oportune avertita de s-ano Cunha pri la ekzakta aliĝnombro, sed malgraŭ tio la misinformo daŭras. Ĉu la farenda korektaĵo aperos en la Jarlibro 1985?

## NOVA REVUO EL JUGOSLAVIO

△ Komence de septembro 1984 aperos en la internacia gazetara scenejo nova revuo el Jugoslavio sub stranga titolo - OVO. Laŭ la eldona projekto, jen la OVO-enhavo: bildstrioj, humoraĵoj, sciencfikcio, (ne)kutimaj intervjuoj, internacia helpo, favoraj vojaĝeblecoj, konkursoj, ŝercoj kaj satiroj pri la E-movado. La legaĵoj estas ĉiam aktualaj kaj konvenaj por ĉiu aĝo kaj ĉiu lingvokona nivelo de Esperanto. Jara abono po 29 nederlandaj guldenoj, ĉe Internacia Kultura Servo, 41000 Zagreb, Amruŝeva 5/1, Jugoslavio. Bonvolu peti provnumeron!

## VIII-ĈIUDUJARA LIBRO-EKSPOZICIO EN SÃO PAULO

△ Neatendita sukeceso kronis la laboron de la organizintoj kaj de la librovendistoj brazilaj kaj alilandaj. Rilate al la internacia lingvo ni nur bedaŭras, ke en la stando de Ĉinujo menia verko en Esperanto estis montrata aŭ vendebla, kontraŭe do al informo aperinta en Esperanto-Notícias, n-ro 19. Kompense, ĉiuj vizitantoj kiuj demandis tie pri aĉetebleco de E-ĉinaj eldonaĵoj ricevis donace ekzempleron de "El Popola Ĉinio" - jaro 1983.

## MEDICINA HEROLDO - ISSN 0102-2350

△ La fama brazila internacia revuo pri Medicino, kiu hodiuaŭ estas legata en pli ol 30 landoj, ĵus ricevis sian Internacian Sisteman Serian Numeron. S-rino Suely A.Maffia, respndeculo pri tiaj aferoj ĉe Brazila Instituto pri Informadiko en Scienco k. Teknologio - IBICT - post detala ekzameno de la lasta numero de tiu revuo, juĝis ĝin ĝusta, laŭ la internaciaj normoj kaj decidis liveri ĝian ISSN-kodon, kiu estas posedata de ĉiu grava internacia revuo en la mondo. De nun, Medicina Heroldo estas listigita ĉe "Centre International d'Enregistrement des Publication en Série" (Internacia Centro por la Registrado de Seriaj Publikaĵoj) en Francio. Gratulon al D-ro Helio F. Aderne, kiu jam de 11 jaroj ĉefredaktas tiun organon de Brazila Esperantista Kuracista Rondo.

## BRAZILIO - BRAZILJA - BRAZILJO

**Roberto Resende**

Ekde la unua momento kiam mi aŭdis la nomon de nia landa ĉefurbo esperante - Brazilio - mi sentis ke ĝi ne tutbone sonis en mia orelo. Fonetike ĝi ne multe plaĉis al mi, sed gramatike mi tute konsentis - oni donis la substantivigan finaĵon-o kaj anstataŭis "s" per "z".

Dum la 66-a U.K. ĝuste en tiu urbo, mi aŭdis samideaninon el eksterlando plendi ke ŝi ĉiam konfuzas la urban kun la landa nomo, ĉar Brazilio finigas per -io kaj Brazilo ne. Mi miris ke mi ne rimarkis tion antaŭe; kaj poste eĉ en libroj mi trovis tian konfuzon (Ekz: Oficiala Situacio de la E.o-instruado en la Mondo - G.Pirlot). Do, mi alvenis al la konkludo ke tiu nomo estas kaj fonetike erara kaj konfuziga por eksterlandanoj.

Ekde kelkaj monatoj oni regule trovas en ĉi tiu Bulteno, la formon - Brazilja. Fonetike brila, sed gramatike, ŝajnas al mi adjektivo . . .

La plej bona propono, laŭ mia vidpunkto, estas tiu pri kiu S-ano Onésimo (tiama direktoro de Esperanto-Instituto de Klerigado en Bel-Horizonto), sciigis min, antaŭ 10 jaroj: Braziljo.

Ekzemple: La brazilja arkitekturo estas moderna, ĉar Braziljo estas planita urbo.

D-ro A. Albault, Prezidanto de Akademio de E-o havas la jenan opinion: "Mi tute aprobas la formon Braziljo por la urbo ... Se vi povus skribi pri tiu preferindeco en Brazila E-o-gazeto, tio estus bonvena ... Sed ekzistas alia urbo kie la sama fenomeno aperas ... Temas pri Tokio ... oni devus diri Tokjo laŭ Japana prononco ... Se naciaj lingvoj permesas al si tiajn modifetojn, mi ne vidas seriozan motivon por ke E-o ne agu same. Des pli ke ekzistas la sufikso -io".

— o —

**Rimarko** — *Trovi kontentigan solvon por la esperantigo de propropraj nomoj estas tiel malfacile, ke eĉ la plej eminentaj E-gramatikistoj ankoraŭ ne interkonsentis pri taŭga regulo. Pro tio, ĉiam atentante la grafismon de la esperantigenda nomo, ni kutime decidas por unu el la tri alternativoj: a) procedi harmonie kun la E-fonetiko, por ke la propra nomo ne perdu sian prozodon kaj nacian karakteron, kaj ĉi-kaze* **Brazilja** *estas pli konvena ol* **Brazilio** *kaj* **Braziljo***; b) obei la substantivigan finaĵon, ekzemple* **Amsterdam - Amsterdamo***; kaj c) konservi netradukeble la originan ortografion de la propra nomo (C. Cunha).*

# BRAZILAJ NOVAĴOJ

## FEDERACIA DISTRIKTO

□ Ĵus kunvokita asembleo de la anoj de BKE elektos la 18-an de novembro, en Florianópolis-SC, la novan estraron de la Asocio por la ofic-periodo 1985/87. Ĉi-Bulteno publikigas oficialan kunvokon subskribitan de la nuna prezidanto, kiu ne pretendas sin prezenti kiel kandidato al kiu ajn posteno en la estonta direktoraro.

□ La lokon kaj daton de la asembleo oni elektis kun la celo altiri al Florianópolis grandan nombron da BKE-anoj, kiuj povas samtempe aliĝi al la 3-a Sudbrazila E-Renkontiĝo, okazonta dum la tagoj 16/18 de novembro.

□ Investon de unu miliono da kruzejroj faras BKE por plibonigi la instalaĵon de sia biblioteka departemento. Novaj verkoj estas aĉetotaj en la libroservoj de BEL kaj KKE, sed donacoj de gravaj esperantlingvaj libroj estas bonvenaj.

□ Esperanto-Asocio de Brasília aĉetis propran sidejon en la flanko norda de la ĉefurbo, per rimedoj venintaj el profito de la 66-a UK.

□ Nia vicprezidanto, Nelson Pereira de Souza, kaj aliaj esperantistoj vojaĝis al Rio de Janeiro por partopreni en la Unua Spiritisma Esperantista Semajno de Bangu, dum la periodo 26/8 ĝis 01/09/84.

## BAHIA

□ La Komerca Lernejo Edvaldo Flores, apartenanta al União Espírita de Vitória da Conquista-BA, malfermis kurson de Esperanto gvidatan de s-ano José de Oliveira Lima. La kurso estas la unua paŝo por oportuna enkonduko de la internacia lingvo kiel lernobjekto en tiu instrua centro.

□ Inácio Bezerra de Araújo, Ricardo Oliveira de Araújo (patro k filo), Hélio Alves Brandão kaj Agnaldo Costa Pereira finis, en julio lasta, elementan kurson organizitan de la Grupo Zamenhof (Praça Anchieta, 8 40000-Salvador), de kiu estas sekretario nia delegito José Saraiva Matos.

□ Per letero de 01/06/84, s-ano Hilmar Ilton S.Ferreira (Caixa Postal 7, BR 45600-Itabuna) sugestas ke la plej gravaj brazilaj E-organizaĵoj klopodu sukcesigi la projektitan libron "Brazila Penso pri Esperanto", laŭ plano de "Shogum Arte" eldonejo (Caixa Postal 43021, BR 22052 - Rio de Janeiro-RJ), kiu stagnas pro manko de sufiĉa kunlaboraĵo.

## MINAS GERAIS

□ Nia klera kunlaboranto en Divinópolis-MG, s-ano Paulo R. Santos, pro motivo sendependa de lia volo, decidis prokrasti ĝis la venonta jaro la inaŭguron de planita kurso por E-komencantoj en la urbo Itaúna. Kompense, la ĉi-jara kurso funkcianta en Divinópolis sub lia lerta gvidado evoluas kontentige, malgraŭ kelkaj rezignoj.

□ El Belo Horizonte, nenia informo ĝis nun transiras la limojn de la urbo rilate al la estonta 21-a Brazila Kongreso de Esperanto, en 1985. Sed trankviliĝu la esperantistaro; ĉiuj scias, ke la minanoj ŝatas labori silente! . . .

□ Laŭ informo de Aliança Municipal Espírita de Além Paraíba (Rua Expedicionário Manoel de Souza, 139 - Vila Laroca - Alêm Paraíba-MG), oni plivivigas la lokan E-movadon per starigo de elementa kurso, kiun gvidas s-ano Élio Lopes de Oliveira, estrarano de la Aliança kaj samtempe UEA-delegito.

## PARANÁ

□ Ni ĝojas pro la apero de "Paraná Informilo", oficiala organo de Paraná Esperanto-Asocio (Rua Dr. Muruci 542, salas 1201/2, Curitiba). Belaspekta, bone kompostita kaj presita, la nova bulteno enhavas ĝeneralajn informojn por la loka publiko kaj pripensindajn opiniojn pri la nuntempa etoso de la nacia E-movado. Ambaŭmane ni gratulas la estraron de PEA pro la feliĉa iniciato kaj deziras longdaŭran ekzistadon al ĝia bonvena informilo.

## RIO DE JANEIRO

□ La Spirita Eldona Societo F. V. Lorenz (Caixa Postal 3133, BR 20001-Rio) jam pretigis la numeron de Almanako Lorenz 1985 kaj ĵus sendis al la presejo la manuskriptojn por publikigo. Por la membroj de la Societo la estraro proponas antaŭmendon kun antaŭpagon, kun rabato de 50% por minimume 10 ekzempleroj.

## RORAIMA

□ La ĵurnalo O Roraima, de Boa Vista, en la numeroj 348 k 350, de 24/6 kaj 01/7/84, publikigis la tutan tekston de la regularo pri strukturo kaj memfunkciado de la Nacia Esperanto Komisiono. NEK tuj leterumis prezentante sian dankon al la Ĉefredaktoro, kaj niaflanke, ni varme gratulas s-anon Raimundo Dourado, kiu respondas por la kolumno Esperanto en tiu gazeto.

□ La junulo Washington Luiz Aquino de Souza estas la unua esperantisto el Roraima aliĝinta al BKE. Kiu estos la dua?

## SANTA CATARINA

□ D-ro Walter Boppré, inda prezidanto de EASC - Esperantista Asocio de Santa Catarina (Pça. 15 de Novembro 21, 4º andar, CEP 88000 - Florianópolis) ĵus ekspedis novan cirkuleron pri la III-Sudbrazila Renkontiĝo de Esperanto, kiu nepre okazos dum la periodo 16/18 de novembro, en la Instituto Estadual de Educação. La patrono de la Renkontiĝo estas Lia Ŝtatestra Moŝto D-ro Esperidião Amin Helou Filho, kiu ĉeestos persone la solenan malfermon.

□ Jen la ĉefaj programeroj de la Renkontiĝo, laŭ informoj liveritaj de d-ro Evaldo Pauli: 16/11 - Akcepto de esperantistoj (14H00), Interkonatiĝo (18H00), Solena Malfermo (20H00). 17/11 - Konferencoj ekde la 9H00: Faka uzo de Esperanto; O verbo no Esperanto; (11H30) Kunsidoj de Asociaj Estraranoj kaj Delegitoj; (14H00) Prelegoj pri Homaranismo kaj pri Instruado de Esperanto; (17H00) Debatoj pri temoj de la prelegoj; (19H00) Arta Vespero. 18/11 - Ĝenerala Asembleo de BKE (9H00); Libervolaj paroloj; kunfratiĝa adiaŭa tagmanĝo.

□ BKE invitas siajn anojn partopreni amase tiun Renkontiĝon kaj ĉeesti en la lasta tago la

ĝeneralan asembleon dum kiu oni elektos novan estraron por la oficperiodo 1985/87.

**SÃO PAULO**

☐ La libro "Na Rota do Ano 2.000" (Survoje al jaro 2.000), verkita de Celso Martins, entenas longan ĉapitron pri Esperanto. Aĉetebla po Cr$ 2.400 kaj mendela ĉe la eldonejo ABC do Interior - Caixa Postal nº 8, CEP 18.570 - Conchas-SP.

☐ Keltaj tagoj post la okazigo de la kongreso en Campinas, s-ano Carlos Cunha kunvenigis en sia hejmo diversajn esperantistojn por revidi per TV-kasedo la ĉefajn erojn de la kongreso zorge filmitajn de D-ro Ivo Sanguinetti. La sesio daŭris pli ol du horoj, ĝis la noktomezo, kiam oni servis feste aranĝitan manĝotablon plena je itala pano, ŝinko, diverskvalitaj fromaĝoj kaj vinoj. La agrablan kunvenon partoprenis gasemideanoj Furico, Hollanda, Francini, Rosa, Francisca, Sanguinetti, Conceição, kaj aliaj amikoj kaj familianoj de l' gastiganto.

☐ La 5-an de aŭgusto, pro iniciato de la gejunuloj Luiz Antonio R. dos Reis kaj Ana Maria Moraes Anunciato kaj apogo de Sorocaba Esperanto-Klubo, oni fondis en la urbo São Roque la unuan Esperanto-Grupon por disvastigi la lingvon tie. Ĉeestis la solenaĵon prof-ino Elvira Fontes, kiu akceptis la inviton fari la ĉefan prelegon. La adreso de Esperanto-Klubo de São Roque estas Av. João Pessoa, 680 - 18.130 - São Roque-SP.

☐ La numero 484 de "O Semeador" (oficiala organo de Spiritisma Federacio de l'Ŝtato São Paulo) kaj la aŭgusta numero de la ĉiumonata gazeto "Folha Espírita" (posedaĵo de Editora Jornalística Fé Ltda.) uzis siajn unuajn paĝojn por laŭdi grandlitere la sukceson de la XX Brazila Kongreso de Esperanto. La raportaĵoj de ambaŭ gazetoj estas longaj, detalaj kaj ilustritaj per belaj fotoj.

☐ El la Ŝtata Leĝofora Asembleo de Deputitoj ricevis la prezidanto de la Organiza Komitato de la XX BKE oficialan leteron kun informo laŭ kiu la deputito Antonio Scopel prezentis petskribon n-ro 2024/84, kun la celo registrigi en la kunsidprotokolo gratulmesaĝon pro okazigo de tiu kongreso. La propono estas aprobita de la deputitaro kaj meritis sian diskonigadon per la "Ĵurnalo de l'Asembleo", de 1984 08 09.

☐ Dum la XX Brazila Kongreso de Esperanto, la katolikaj esperantistoj, sub la gvido de Pastro Pedro H. Urbaitis, elektis la unuan estraron de Brazila Esperantista Katolika Organizo, nome: Prof. Euclides Carneiro da Silva (prezidanto), S-ino Yolanda Evangelista Silveira (v. prez.), Prof-ino Ângela B. Del Antonio B. Rodrigues (kasisto), Eluizio Bueno Rodrigues (sek.) kaj Pe. Pedro Urbaitis (estrarano por la gazeto Brazila Katoliko). Jara kotizo por 1984 estas de Cr$ 5.000, kiun la interesitoj devas sendi al la adreso de BEKO, Caixa Postal 234, CEP 18.100 - Sorocaba-SP. Al ĉiuj estraranoj ni deziras fruktodonan laboron kaj feliĉan oficperiodon.

☐ Tri kleraj, respektindaj movadanoj multe distingiĝis en Campinas, pro la kompetenta senpartia kunordigado de ĉiuj debatoj pri la Kongresa temo: s-roj José Dias Pinto, Paulo Sérgio Viana kaj Gilbert R. Ledon. Al ĉi-lasta oni aldone kreditu la altvaloran rezulton de du aŭkcioj, ambaŭ kondukataj kun laŭdindaj gajhumoro kaj lerteco.

✝

**AGOSTINHO RODRIGUES**

La 19-an de julio lasta, en la urbo Salto-SP, forpasis nia altestimata samideano Agostinho Rodrigues, viktimo de terura gripo kiu malfortigis senrimede lian koron.

Estas malfacile tion kredi, car s-ano Agostinho estis dik-muskola homo, aktiva, plena je energio kaj ĉiam aspektis kiel persono vendanta bonfarton!

Valora membro de Salto Esperanto-Klubo, kaj senlaca batalanto por Esperanto en Sorocaba-SP kaj ĉirkaŭaĵoj, lia forpaso estas neriparebla perdo por la regiona movado.

Al lia filino Luzia kaj ceteraj familianoj, la estraro de BKE prezentas konsternite sincerajn kondolencojn pro la fatala okazaĵo.



## LASTE APERIS

### FAKTOJ KAJ FANTAZIOJ

Ĵus aperis la longe atendita legolibro "Faktoj kaj Fantazioj" de la fama verkistino Marjorie Boulton.

"Faktoj kaj fantazioj" ekzercigas pri frazkonstruado kaj pligrandigas la vortostokon de la leganto. Uzante simplan stilon, Marjorie Boulton sisteme enkondukas utilajn esprimrimedojn.

Bona lernilo devas esti interesa. Tion Marjorie Boulton lerte atingas en 52 variaj ĉapitroj, plenaj de fabeloj, mirindaĵoj kaj rakontoj pri homaj atingoj kaj kuriozaĵoj el la tuta mondo. ili igas la leganton streĉe atenti, miri, kortuŝiĝi kaj ridi.

La libro estas broŝurita kun dukolora kovrilo, speciale desegnita de Franko Luin. Ĝi estas ilustrita i.a. per desegnaĵoj de Alex Brychta. La formato estas A5 (210mm) kun 431 paĝoj, inkluzive de glosaro kaj biografio pri la aŭtorino. ISBN 92 9017 028 X. Prezo: 36,00 gld. plus sendokostoj. Mendu ĉe la Libroservo de UEA. Rabato de unu triono por minimume tri ekzempleroj (Eldona Fako de UEA).

### AŬDU KAJ LERNU

**Legolibro 1/Elementa**

Post la sukceceso de la radi-kurso "Aŭdu kaj Lernu" (2 libroj kaj 6 sonbendoj), de afiŝo-disko-kurso "Kantu kaj Lernu" (2 libroj, 1 afiŝo kaj 4 diskoj), Sylla Chaves nun prezentas al vi la unuan legolibron de paŝ-post-paŝa kurso "Aŭdu kaj Lernu", kiu havas kaj la avantaĝojn de aŭdvida lernilaro kaj tiujn de la rigora sekvo de la principoj de kibernetika pedagogio. Ĝi ja estas agrabla kombino de scienco kaj arto.

Ĉi tiu legolibro taŭgas por internacia uzado per rekta kaj per nerekta metodo. Aldonaj lerniloj de Sylla Chaves (diskoj, sonbendoj kaj gvidiloj) povas esti uzataj, sed ne devige. La instruisto elektu vortaron kaj aldonu gramatikajn klarigojn laŭbezone. Mendebla ĉe BEL-libroservo en Rio de Janeiro-RJ.



Ivon Barbosa, la ĉeforatoro Prof. Benedito Silva kaj Nelson P.Souza, intertempa tradukinto



Apud monumento al Zamenhof, inaŭgurita en la placo Napoleão Laureano.




S-ano Barrocas (Urugvajo), kaj la plej juna kongresano



Inter belaj kongresaninoj, s-ro Henrique Kohei (Argentino)



Gesinjoroj Denise kaj Wilson Deslandes



D-ro Sanguinetti kaj s-ino Rosa, en la hejmo de Cunha, atentas kongresan TV-kasedan filmoraportaĵon preparitn de la unua



D-ro Oswaldo P.Holanda kaj Eurico Ribeiro rigardas saman TV-raportaĵon



En la bosko, Pastro Urbaitis kaj liaj skolanoj

## CONSELHO BRASILEIRO DE ESPERANTO

**Assembléia Geral Ordinária**
**Edital de Convocação**

De conformidade com o Art. 14, letra "b" dos Estatutos, convido os associados do Conselho Brasileiro de Esperanto a se reunirem em Assembléia Geral Ordinária a ter lugar em Florianópolis (SC), no Instituto Estadual de Educação Dias Velho, no dia 18 de novembro de 1984, às 9 horas, a fim de deliberarem sobre a seguinte:

**Ordem do Dia**

a) leitura, discussão e votação da ata da assembléia anterior;
b) apreciação das contas do exercício de 1983 e do relatório da Diretoria;
c) eleição de membros da Diretoria e do Conselho Fiscal para o triênio 1985/87;
d) assuntos de interesse social.

São Paulo (SP), 31 de agosto de 1984

a) Carlos A.S. da Cunha - Presidente

**Observações:**

I - Para a eleição em pauta, os interessados deverão organizar chapas completas contendo os nomes de todos os candidatos a cargos na Diretoria (presidente, vice-presidente, secretário, tesoreiro e diretor cultural) e no Conselho Fiscal (três membros efetivos e dois suplentes), as quais serão levadas a registro junto à Presidência do BKE - Alameda dos Maruás 471, CEP 04068, São Paulo-SP, até 30 dias antes do pleito (Art. 19). O pedido de registro será formalizado por carta subscrita apenas pelo candidato ao cargo de presidente da Diretoria, que juntará sua chapa em duas vias, uma das quais lhe será devolvida, com data e protocolo de seu recebimento.

II - Os candidatos poderão residir em qualquer parte do País, com exceção dos pretendentes aos cargos de Secretário e Tesoureiro, que serão domiciliados em Brasília, Distrito Federal (Art. 12, § 2º).

III - Em vista de recomendação do XX Congresso Brasileiro de Esperanto, também será acolhido voto por correspondência, cuja cédula deve ser postada no Correio, em envelope fechado, até o dia 05-11-84. Dito envelope deverá ser endereçado como segue: Assembléia Geral do BKE, a/c da Presidência, no endereço acima e conterá no verso o nome do associado votante. A correspondência da espécie será aberta somente no dia do pleito, pelos escrutinadores.

IV - De acordo com o Art. 6º, § 2º, os votos serão apurados com os seguintes pesos: 20 para os sócios categoria "A" (organizações especificamente esperantistas); 10 para os da categoria "B" (instituições esperantistas especializadas); e 1 (hum) para os da categoria "C" (pessoas físicas).

## 20.a BRAZILA KONGRESO DE ESPERANTO
### Kongresa Ĉeftemo

**REZOLUCIO**

Oni prezentis kelkajn tezojn kaj opiniesprimojn, kiuj, aŭ pledis por toleremo kaj amo, aŭ estis variantoj de proponoj pri kunfandiĝo de la tri tutlandaj organizoj.

Pri la neceso de toleremo, amo kaj kunlaboremo ĉiuj unuanime konsentas.

Pri la maniero, eblo aŭ eĉ neceso de la kunfandiĝo forestas la unuanimeco, ĉefe, sed ne nur, flanke de la respondeculoj pri la tri organizoj.

Tial, konsiderante ke:

1) la tri organizoj jure ekzistas kaj fakte fruktodone laboris kaj laboras por Esperanto;
2) ili pli kaj pli kunlaboras kaj emas pluiri tiun vojon;
3) ties respondeculoj jam konsistigas iuspecan superan konsilantaron por la komuna agado;
4) ni ne estas tiel riĉaj je sindonaj, malavaraj kaj kompetentaj porbatalantoj, ke ni povas facilanime perdi kelkajn;
5) la ĉefaj plendoj celas la disdividon de la fortoj kaj la ekziston de pluraj kotizoj,

Ni rekomendas ke:

1) eventuale survoje al estonta iama kunfandiĝo, oni faru plaan paŝon per la enkonduko de unu sola kotizo;
2) cele al plia demokratigo, oni enkonduku en la tri organizojn la perleteran balotilon;
3) oni dividu la taskojn je, ekzemple:
   informado,
   interna vivo,
   instruado;
4) oni daŭre havu la superan kunordigadon de NEK;
5) oni publikigu unu solan gazeton (monate).

## SUKCESA KAMPANJO

En la pasinta jaro ni lanĉis kampanjon kun la celo kreskigi nian anaron ĝis 250 membroj individuaj.

Favora rezulto kompensis nian laboregon! Kaj nun ni havas la plezuron anonci, ke tiu aliĝnombro estas superita post la bonvenaj aniĝoj de jenaj samideanoj:

Vivaldo Marcelino da Silva - RJ
Jaime Splettstoser Jr. - SP
Lannoy Dorin - SP
Washington Luiz A. de Souza - RR
Jair Salles - RJ

— o — o —

Ĉu estus oportune pensi pri nova kampanjo?

## NACIA ESPERANTO-KOMISIONO

**Protokolo pri la kunsido en 1984 07 14**

La 14-an de julio 1984, de la 14:30 ĝis la 15:20 horoj, en la urbo Campinas-SP, kadre de la 20-a Brazila Kongreso de Esperanto, kunsidis la naturaj membroj de NEK, nome Fernando José Galvão Marinho, prezidanto de BEL, D-ro Álvaro Fausto de Souza, prezidanto de KKE kaj Carlos Augusto Siqueira da Cunha, prezidanto de BKE, por pritrakti aferojn ligitajn al la brazila Esperanto-movado. Ankaŭ partoprenis la kunsidon s-ro Nelson Pereira de Souza, kiel reprezentanto de Laborgrupo Antaŭen, s-ro Carlos Augusto Guedes, kiel reprezentanto de Instituto Esperanto de Educação kaj D-ro Paulo Sérgio Viana, kiel observanto. Malfermis la sesion s-ano Carlos A. Siqueira da Cunha, kunordiganto de NEK, kiu plendis pro la neĉeesto de aliaj gvidantoj de la movado en ŝtataj sferoj. Aldone, li raportis pri jam faritaj paŝoj de NEK, nome: a) perletera interrilato kun UEA, pere de d-ro Renato Corsetti (estrarano pli planado, Jubilea Jaro kaj landa agado) kaj s-ro André Staes, administranto por la Jubilea Jaro, en la Esperanto-Centro de Belgujo; b) ekspedo de Cirkulero n-ro 83/01, de 15-08-83, sendante NEK-Regularon al ĉiuj brazilaj E-Asocioj kaj Institucioj favoraj al Esperanto, kaj al ili petante la indikon de reprezentantoj por partopreni en la kunsidoj de NEK; c) sugesto al BEL, KKE kaj BKE, tuj akceptita, por ke la profito de la 66-a UK destinita al la landaj asocioj estu administrata de NEK. Tiu monsumo konsistigas nun la fonduson-NEK, deponitan en ŝparkonto BRADESCO, filio Cinelândia, Rio de Janeiro-RJ, konto n-ro 1.076.041.0; d) daŭrigo de la serio Brazilaj Kongresoj de Esperanto sub aŭspicioj de la tri landaj E-Asocioj, elektinte Campinas-SP, kiel la sidejonde la 20a Kongreso. La fonduso-NEK subvenciis la unuajn kostojn fare de la Organiza Komitato; e) ekspedo de Cirkulero n-ro 84/05, de 18-06-84, al la asocioj ligitaj al la nacia movado, per kiu oni dissendis la givdlibron "Kiu faru kion" dum la kvinjara agadplano por la Jubileaj Festoj, kaj petis, ke la estraroj de tiuj asocioj studu kaj diskutu la libron kaj poste, kun bazo en la lokaj aŭ regionaj kondiĉoj, ellaboru siajn proprajn planojn; f) ĉar 80 da tiu libro plus sendokosto el Eŭropo ni ricevis donace de la belga administranto de por la Jubilea Jaro, S-ro André Staes, NEK decidis reciproki la komplezon per mondonaco de 500 guldenoj al la Internacia Jubilea Fondaĵo, por montri la solidarecon ne nur de BEL, KKE kaj BKE, sed de la brazila movado al la internacia festado por la Centjariĝo de Esperanto; g) NEK, pere de sia membro Fernando José Galvão Marinho, ekplanas kontaktojn kun gravaj personoj en la lando, por inviti ilin fariĝi membroj de la Nacia Patrona Komitato por la jubilea periodo; inter ili certe estos invititaj la Ministro por Edukado, prezidanto de la Televida Reto Globo, senatano José Lins Albuquerque, deputito Freitas Nobre, prezitando de la Fondaĵo Getulio Vargas, prezidanto de ABI kaj aliaj. S-ano Carlos A. Siqueira da Cunha ankaŭ anoncis, ke nur kvin organizaĵoj ĝis nun nomigis reprezentantojn por partopeni kaj voĉdoni en la kunsidoj de NEK. Ili estas: Brazila Spiritisma Federacio, Laborgrupo Antaŭen, Niterói Esperanto-Klubo, Esperanto-Klubo de Montes Claros kaj Spirita Eldonejo F.V. Lorenz, representataj respektive de Affonso Borges Gallego Soares, Nelson Pereira de Souza, D-ro Joaquim do Couto, Wanderlino Arruda kaj Délio Pereira de Souza. Aldone, la kunordiganto de NEK, s-ro Cunha informis, ke multaj estas la organizaĵoj kiuj jam anoncis siajn kontribuaĵojn kadre de la festprogramo por la Jubileo. Inter ili menciindas: Grupo Esperanto e Paz (Av. Cândido Lúcio n-ro 420, Belo Horizonte-MG), kiu eldonis glumarkon; Brazila Spiritisma Federacio (Av. Passos 30 - Rio de Janeiro-RJ), kiu reeldonos la elĉerpitajn librojn: Esperanto Modelo, Monumento de Carlo Bourlet, Diverskolora Bukedo, Esenco kaj Estonteco de la Ideo de Lingvo Internacia, Voĉoj de Poetoj el la Spirita Mondo kaj D-ro Esperanto, tiu ĉi lasta ĵus aperinta en la dua portugallingva eldono: Spirita Eldonejo F. V. Lorenz, kiu lanĉos en 1985 la verkon Brazila Antologio Poezia, kun 315 poezioj de 135 ĉiuepokaj brazilaj poetoj; kaj fine Laborgrupo Antaŭen, kiu lanĉos novajn brazilajn kajerojn. Post tiu ĉi komuniko, oni pritraktis la elekton de sidejon por la 21-a Brazila Kongreso de Esperanto en 1985, ĉar por la du sekvontaj jaroj ekzistas ja antaŭa interkonsento pri la urbsidejoj: Salvador (1986) kaj Rio de Janeiro (1987). Ununuran proponon ni ricevis, tiun de Instituto Esperanto de Educação, kiun plezure ni akceptis unuanime. Belo Horizonte estos la urbsidejo de la 21-a Brazila Kongreso de Esperanto. La elektota kongresa temo, por propono de Laborgrupo Antaŭen, povas esti "Paŝe al Centjariĝo de Esperanto", kondiĉe ke regionaj cirkonstancoj ne konsilu preferon por alia temo, laŭ plaĉo de la Kongresa Organiza Komitato, interkonsente kun NEK. Dum la kunsido oni aludis al la konveneco eldonigi brazilan jarlibron, kiu entenus ĉiujn nomojn de unuopuloj kaj institucioj esperantistaj agantaj ĉie en la lando. Estis rekomendita studo cele al antaŭpreparo de tiu projekto. Sen alia afero por trakti, la kunsido finiĝis per averto al la reprezentanto de l' Instituto Esperanto de Educação, laŭ kiu ĝi devas sendi konfirman invitleteron al NEK, samtempe indikante periodon de la kongreso en Belo Horizonte kaj la nomojn almenaŭ de la Prezidanto kaj Vicprezidanto de la Kongresa Organiza Komitato, se neeblus tuj indiki la tutan membraron de tiu komitato. Mi, Carlos Augusto Siqueira da Cunha, kiel kunordiga membro de NEK, redaktis tiun ĉi protokolon kaj ĝin subskribas. En la urbo Campinas-SP, la 14-an de julio 1984. a) Carlos A. S. da Cunha - Kunordiganto.

### ŜAKLUDO

*C7R estas la korekta movo por solvi la problemon aperintan en nia Bulteno n-ro 83. Multajn respondojn ricevis la redakcio, sed nur la subaj ŝakludamantoj indikis korekte la ŝlosilon de la problemo: C. Junqueira, Armando Cruz, T. Nakashima kaj Helena Bruce.*